


Kukaburo, aŭstralia birdo



Esperanto sub la Suda Kruco

Novembro-Decembero 2003
Numero 66 (Volumo 11, no. 6)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Numero 66 (volumo 11, numero 6), Novembro-Decembero 2003

Redaktoro: Donald Broadribb
PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: sudakruco@sudakruco.org

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St, Redfern, NSW 2016, Aŭstralio.

E-poŝte: libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio.

E-poŝte: hazgreen@twmba.net

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso: sudakruco@sudakruco.org; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitaĵojn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

EN ĈI TIU NUMERO

Pri la Universala Konreso de Esperanto en Gotenburgo (Bob Felby)	3
Ĝisdata novaĵo pri la komuna kongreso de AEA/NZEA (Kay Andersen).	5
Mellel: New Esperanto Word Processor for Macintosh Computers	6
Post 50 jaroj (Vera Payne)	8
Nokto da turmento (Franciska Toubale)	10
Laŭ mia vidpunkto (Marcel Leereveld)	11
El la sekretariejo.	13
Interrete	14
Mortis Harold Paterson (Betty Aulsebrook)	14
Internacia Esperanto-Muzeo translokiĝos	15
Skribas la legantoj: Brendan Linnane.	18
Deziras korespondi	18
Iom da blogo (Gonçalo Neves)	19
For the World's ABC's He Makes 1's and 0's (Michael Erard)	21
Malĉeesta instruado de Esperanto en Aŭstralio (Hazel Green).	25
Odlo Bokserp.	26
Indekso de <i>ESK</i> 2003	28

ESK estas legebla per Interreto, ĉe <http://www.esperanto.org.au/esk>

Limdato por la venonta numero: 15 decembro.

Pri la Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo

de Bob Felby



Bob Felby

Ĉar mi deziris preni parton en la 88-a Universala Kongreso de Esperanto de la 26-a de Julio ĝis la 2-a de aŭgusto, kaj ankaŭ viziti Børge-n, mian fratron, en Svendborg, (Svenburgo)?, Danujo, mi forflugis jam jaŭdon la 16-an de julio de Adelajdo, kaj surteriĝis en la flughaveno en Kastrup, tre proksime al Kopenhago, vendredon en la mateno.

Tie min atendis Børge, kiu akompanis min vagonare al Svendborg.



Sabaton la 26-an mi ekveturis vagonare de Svendborg al Gotenburgo. Nu, por tiu vojaĝo mi kutime bezonus nur proksimume kvar horojn per vagonaro tra Danujo kaj Svedujo, sed ĉar la sveda registaro, ne la ordinaraj svedoj, pro malsaĝeco privatigis la svedajn fervojojn, la vojaĝo de Svendborg ĝis Gotenburgo, tra Svedujo, kostas dekoble pli ol tiu sama vojaĝo tra Danujo. Mi do decidis vojaĝi tra Danujo. Unue mi devis iri al Odense, kie mi devis ŝanĝi al alia vagonaro, kiu iras al Aarhus. De Aarhus al Aalborg, kaj de Aalborg al Frederikshavn. Normale oni ŝanĝas nur en Odense, sed tiun tagon la lokomotivo decidis laciĝi, kaj tial mi devis ŝanĝi en Aarhus. Ĉar

Aalborg estas unu el la lastaj urboj en Jutlando, ne ĉiuj vagonaroj veturas pli norden, kaj tiu, kiun mi prenis en Aarhus devis do resti en Aalborg, dum mi devis ŝanĝi al alia, kiu iras al Frederikshavn.

De Frederikshavn necesis al mi piediri kelkajn kilometrojn al la pramejo laŭ malnova ne plu uzata fervojlinio. Tio daŭris proksimume 20 minutojn.

La vojaĝo trans la maro, Kategato, daŭris iom pli ol tri horojn kaj 15 minutojn. La tuta vojaĝo de Svendborg ĝis Gotenburgo daŭris do preskaŭ same longe kiel vojaĝo inter Adelajdo kaj Melburno !



En la haveno de Gotenburgo mi prenis taksion al Hotelo Excelsior. Diris la ŝoforo, ke al Excelsior estas fiksita prezo, nome svedaj kronoj 200 = \$Aŭ40. Du minutojn poste ni haltis antaŭ la hotelo, kiu situas en malpli bona kvartalo de Gotenburgo, proksime al la haveno. Poste mi eksciis, ke la prezo devus esti nur 10 svedaj kronoj aŭ \$Aŭ2!

De la hotelo du genederlandanoj montris al mi la vojon al la kongresejo (mi ne plu kuraĝis iri taksie!). Ekster la kongresejo renkontis min la du fa-



Fontano

maj fratinoj aŭstraliaj, Joy Turvey kaj Helen Baguley. Tie mi renkontis ankaŭ Franziskan Reisel, kiu ĉiam ĉe-

estas niajn somerkursarojn, kaj Atilio Orellana Rojas-on, ĉiama instruisto dum la samaj eventoj.

Ene de la kongresejo mi renkontis Reinard Kurz-on, alia konanto kaj konato de Aŭstralio, kaj iom poste eĉ lian moŝton, Trevor Steele.

Survoje hejmen al la hotelo mi perdis mian vojon, sed tre bonkora franca samideano helpis min.

Pri unu afero oni ĉiam povas esti certa. La bildoj en la turistobroŝuroj neniam spegulas la realon. Laŭ la bildoj estas eĉ tre larĝaj strategoj en Gotenburgo, kaj vere ili ekzistas, sed ili ne estis belaj, ĉar kiel ĉiam oni vojlaboras. Ni esperantistoj vidis nur profundajn truojn, fosmaŝinojn kaj ŝvitantajn laboristojn.



Merkredo estis tago libera, kaj mi iris por trovi Esperantoplatsen. Ĝi situas en la havenkvartalo, sed konsistas el nur L-forma strateto kun multaj bariloj malantaŭ kiuj sin trovas ŝvitantaj laboristoj apud granda, profunda truigo en la tero.

En la kongresejo mi subite renkontis Frans Jæger-on, kies gramofondiskon preskaŭ ĉiu esperantisto havas. Li naskiĝis en Kopenhago, kaj elmigris al Usono en 1953. Mi naskiĝis en Kopenhago kaj elmigris al Aŭstralio en 1974. Frans kaj mi renkontis Ole Hansen-on en la Informĝiĉeto. Ankaŭ li naskiĝis en Kopenhago kaj elmigris al Svedujo

en 1975. La mondo plenplenas de koincidoj, ĉu ne? Sed malgraŭ ĉio, ŝajnas ke Ŝekspiro pravis, kiam li eldiris la famajn vortojn: “Estas io putra en Danujo”!

Dimanĉan matenon mi proprinteligente trovis la kongresejon. Ĝi estas grandega konstruaĵo meze de Gotenburgo. Apud la kongresejo mi renkontis miajn du preferatajn aŭstralianojn, Hazel kaj Paul Green.



Du turoj 23-etaĝaj konsistigas Hotelon Gothia Towers el kies restoracio sur la plej supra etaĝo oni povas

bonege vidi la tutan urbon kaj eĉ pli. Precipe amuzis min vidi kiom malgranda aspektas la plej granda amuzejo (Liseberg), de Nordeŭropo el la fenestroj tie.



Ĉar ĉiam multaj programeroj okazas samtempe ne eblis al mi ĉeesti ĉiujn. Sed mi sukcesis preni

parton en la Solena Imaĝuro, en kiu bonvenigis nome de Aŭstralio nia Hazel Green. Krom tio mi travivis unu lecionon de *Sveda Eksprese*. Mi ĉeestis la kunvenojn de T.E.V.A. kaj I.L.E.I. Mi parton prenis ankaŭ en ĉiuj kunvenoj de Martinus-Instituto. Mi ankaŭ ne forgesis ĉeesti unu el la kunvenoj de Oomoto kaj Amikaro de Bruno Gröning. Ĵaŭdon la 31-an de julio prezentis magiaĵojn kelkaj el niaj germanaj samideanoj.

Unu el la plej gravaj kaj interesaj kunvenoj estis tiu de Rondo Kato. Dum tiu kunveno mi renkontis mian malnovan amikon el Germanujo, profesoron Reinhard Selten kaj ties edzinon, Eliz-



Svenska mässan

abeth. Reinhard kaj mi renkontiĝis la unuan fojon en Frankfurto sur Majno, kiam li studis en la tiea universitato. Poste li fariĝis nobelpremiito. Mi fariĝis pensiulo.

Kvankam interesa estis ankaŭ la Internacia Arta Vespero, plej imponis min la Nacia Vespero. Ni vidis pres-

kaŭ la tutan historion de Svedujo, ekde iu reĝo ĝis Pippi Ŝtrumpolonga. Mi havis ankaŭ la honoron sidi apud Bertil Nilsson, la tradukinto de *Orm la Ruĝa* verkita de Frans G. Bengtsson, verko kiun ĉiu bona esperantisto jam konas; se ne, ĝi aĉeteblas ĉe U.E.A.

Mi ne forgesu la kunvenon de la Mondcivitanoj, dum kiu mi eksciis, ke mi estas membro de kiam mi instruis Esperanton en la labortendaro Gribskov en Danujo ekde 1954 ĝis 1956.

Nenion pli eblas al mi diri pri la kongreso. Mi ne ĉeestis la lastan sabaton, ĉar mi devis ja piediri al la haveno, ĉar mi ne plu fidis la gotenburĝajn taksiŝoforojn. □

Ĝisdata novaĵo pri la Komuna Kongreso de A.E.A./N.Z.E.A.

de Kay Andersen

Ĝis nun, 30 bonvolaj esperantistoj decidis veturi al Redcliffe, en la bela ŝtato Queensland, por partopreni la komunan kongreson. Sed, tiu nombro ne sufiĉas — ni bezonas pli da aventuremaj esperantistoj, almenaŭ pliaj dek partoprenantoj. Vizitu nin kaj pasigu interesan, stimulan semajnon en la Sunbrila Ŝtato.

Kompreneble, estos la seriozaj sesioj de la Jara Ĝenerala Kunveno kaj fakaj kunsidoj. Aliflanke, okazos malpli seriozaj programeroj kiuj akordos kun la temo “Esperanto por plezurigi vian vivon”. Kelkaj novzelandanoj jam konsentis veni kaj

prezenti pensigajn erojn.

Franciska Toubale montros al ni kiel uzi Esperanton teatrume. Jennifer Bishop gvidos konversacian rondon por postkomencantoj. Ĉi-matene ni povos bonvenigi novan tagon per Taj Ĉi kun Terry Manley. Anstataŭ la sap-skatola horo, okazos kvizo kun la kvizestro Bernie Heinze. Ni ne forgesis inkludi ekskurson, aŭtobuse, tra la historia regiono, la loko de la unua eŭropa kolonio en Queensland.

Do, venu norden dum januaro kaj ni certe bonvenigos vin.

kjand@ozemail.com.au □

Mellel

New Esperanto Word Processor for Macintosh

by Donald Broadribb

October 14 saw the public appearance of the first Apple Macintosh computer word processor in Esperanto.¹ Named Mellel, this computer program is a multi-lingual word processor using unicode, now available in 11 languages: Dutch, English, Esperanto, French, German, Italian, Japanese, Polish, Romanian, Spanish, and Swedish.

The Esperanto version of Mellel was prepared, in collaboration with the authors of Mellel, by Dr Donald Broadribb, the editor of *Esperanto sub la Suda Kruco*.

All menus and submenus, announcement windows, and other parts of the program with which the user deals are entirely in Esperanto. An Esperanto spelling checker, *Aspell*, is also available for use with Mellel. Also available are Esperanto keyboards for users of the ordinary QWERTY system (the traditional English language layout of typewriter/computer keyboards) and the AZERTY system (in common use by speakers of European languages).

Mellel was constructed specifically for use with Apple Macintosh computers running System OS X. Mellel can-

not be used for other computer systems.

The price of Mellel is US\$25. Mellel can be downloaded from www.redlers.com. The Aspell spelling checker can be downloaded for free from www....., and the Esperanto keyboard can be obtained, also for free, from the editor of *Esperanto sub la Suda Kruco*.

Mellel is a full featured word processor. Among its many features are a full set of customizable program and document preferences; fully customizable styles which include page, paragraph, character, and font details; a particularly innovative table making function; tools for bibliography making; special provision for writing from left to right (as in European languages), from right to left (as in Middle Eastern languages), or in traditional Chinese and Japanese styles, and for mixing these methods and languages on the same page or even line of text; multiple footnote and endnote facilities for ordinary and for technical texts; reading and writing rtf documents; and much else.

Having installed Mellel, the user need only make *Esperanton* the preferred language in the computer system preferences' "International" window.

1. A program named *Ĉapelilo* has for some years been available for Windows users

Mellel

nova esperanta tekstprilaborilo

por Macintosh

de Donald Broadribb

La 14an de oktobro surmerkatigis la unua tekstprilaborilo en Esperanto por la komputiloj Apple Macintosh.¹ Nomita Mellel, ĉi tiu komputila programo estas multlingva tekstprilaborilo uzanta unikodon, kaj haveblas variantoj por la angla, esperanta, franca, germana, hispana, itala, japana, nederlanda, pola, romania, kaj sveda lingvoj.

Preparis la esperantan version de Mellel la redaktoro de *Esperanto sub la Suda Kruco* D-ro Donald Broadribb, kunlabore kun la aŭtoroj de Mellel.

En Esperanto estas ĉiuj menuoj, submenuoj, surekranaj anoncoj, kaj aliaj eroj de la programo kiujn utiligas la uzanto. Esperanta literumkontrola programo, nomita Aspell, ankaŭ uzeblas kun Mellel. Ankaŭ haveblas esperantaj klavarangoj por uzantoj de la tradicia QWERTY-sistemo (la tradicia tajpil- kaj komputil-klavarango uzata de anglalingvuloj) kaj por uzantoj de la AZERTY-sistemo (multe uzata de parolantoj de eŭropaj lingvoj).

Mellel estis konstruita specife por utiligo per la komputiloj Apple Macintosh uzantaj Sistemon OS X. Mellel ne estas uzebla per komputiloj kiuj uzas

alian sistemon.

La prezo de Mellel estas 25 usonaj dolaroj. Mellel estas elŝutebla ĉe www.redlers.com. La literumkontrola programo Aspell estas havebla senpage ĉe www..., kaj la esperanta klavarango estas havebla, ankaŭ senpage, ĉe la redaktoro de *Esperanto sub la Suda Kruco*.

Mellel estas plenkapabla tekstprilabora programo. Inter ĝiaj multaj kapabloj estas plena aro da difineblaj preferoj por la programo kaj por individuaj dokumentoj; plene difineblaj stiloj (inter ili, por paĝarango, alineoj, signoj, kaj tiparoj); rimarkinde avangarda metodo prepari tabelojn; iloj por fari bibliografiojn; speciala kapablo skribi de maldekstre dekstren (kiel por la eŭropaj lingvoj), de dekstre maldekstren (kiel por la mezorientaj lingvoj), aŭ laŭ la ĉina kaj japana stiloj, kaj por uzi tiujn sistemojn kaj lingvojn sur sama paĝo aŭ eĉ en sama tekstolinio; oblaŭ aroj da piednotoj kaj tekstofinnotoj por normala kaj por specialistaj tekstoj; legado kaj verkado de rtf-dokumentoj; kaj multo alia.

Instalinte Mellelon, la uzanto nur bezonas indiki en la sistem-preferoj de sia komputilo, en la "Internacia"-fenestro, ke li/ŝi ĉefpreferas Esperanton; kaj de tiam Mellel havas sian esperantlingvan formon. □

1. Programo nomita *Ĉapelilo* jam de pluraj jaroj haveblas por uzantoj de Windows-speciaj komputiloj.

Post 50 jaroj


de Vera Payne

1952 estis memorinda jaro. Gregory Peck kaj Audrey Hepburn distris nin en *Roman Holiday*, Nelson Mandela starigis sian jur-oficejon en Sud-Afriko, kaj dudeko da viv-avidaj esperuloj abiturientis el la gimnazio Eastern Goldfields. La Dua Mondmilito malantaŭ ni, la Malvarma Milito ankoraŭ malvarmeta, la hormonoj pumpantaj en nin la vivoĝojon, ni avidis la estontecon, pretaj esplori kaj konkeri la mondon.

Tiamaj fotoj memorinundas nin. Kaj oni povas vidi nun, ke tiu estis la “antaŭ”-epoko: Antaŭ komputilo, televido, vidbendo, DVD-o, e-poŝto, la TTT, eĉ antaŭ telefono en la domo por la plimulto el ni. Antaŭ elektraĵoj lankovrilo kaj pato, plastaj kartoj, mikroondforno, poŝtelefonoj, KAT-skanoj¹, MRI-oj, superatmosfera geofizika bildkaptado, kaj miriado da teknologiaĵoj kun la kapablo mirige bonigi aŭ katastrofe detru la vivon. Antaŭ homo sur la luno.

Antaŭ mini-jupoj kaj antaŭ libero fari kion ajn ni deziras. La Nova Modo ankoraŭ regis. Publike ni portis ĉapelojn, gantojn, ŝtrumpojn ĝemelpuloverojn, kostumojn kaj kostumjuvelaron. Junuloj portis grizan, flavgrizan aŭ mararmebluan vestaron. Nek floro nek koloro por ili tiam! Junulinoj ne sentis la neceson dieti, nek junuloj sin ĝenis pri siaj abdomenaj kaj brustaj muskoloj.

Antaŭ Virinlibereco kaj Bestlibereco.

1. KAT=Komputiligita Aksia Tomografio; MRI = Magneta Resonanca Bildigado; DVD=Digita Vid-Disko. — 

Niaj patrinoj ne stiris la aŭton. Kaj kvankam ni la junulinoj sciis, ke ni disponas je la oportuno plibonigi nian vivnivelon, ni tamen celis relative malalte: esti instruisto, flegisto, sekretario — sed nur ĝis amkonkeris nin Sinjoro Ĝusta. Tamen, male al niaj patrinoj, ni ja pligrandigis niajn horizontojn por atingi iom da ĉio: Sinjoron Ĝ, geinfanojn, hejmprizorgon kaj karieron.

Ni estis pli tenacaj, sanaj, fortaj. Ni biciklis al la lernejo dum bruliga somero kaj frostiga vintro (la fingroj kaj piedfingroj restis sensentaj la tutan matenon). Sen klimatizilo, ventumilo, varmigilo. Elementlernejaj knaboj piediris sensuaj — neniam fitimuloj tie! Dum la somero ni spektis filmojn sub la steloj, sidante en ferdekseĝoj. Ni dormis sub tiuj samaj steloj, sur la gazono antaŭ la domo, dum tiuj varmaj varmaj noktoj, kaj ni ne ŝlisis la pordon ĉu ni estis hejme aŭ ne. (Se ni ja ŝlisis, ni lasis letereton por klarigi kie estas la ŝlosilo!) Ni ankaŭ ne ŝlisis la aŭtopordojn, kaj ofte lasis la ŝlosilon en la startilo.

Serimurdado, infanseksperforto, seksperforto, incesto, murskribaĉo, vandalismo, terorismo? Ĉu vi frenezas?

Antaŭ senlaborado kaj antaŭ supermerkatoj. Butikumcentroj ankoraŭ jardekon for, en Okcidenta Oz. Ĉiam estis sufiĉe da tempo por fari ĉion! (Sciu, tamen, ke, se mia panjo diris, ke mi faru ion, tio signifis — nun!) Estis futbalo por ludi aŭ spekti sabatposttagmeze, kaj dancoj sabatvespere. Dimanĉo estis rostviandotago. Konversacio dum ĉiuj familiaj manĝoj estis la

normo. Oni plukis florojn el la propra ĝardeno por donaci, kvankam je specialaj okazaĵoj korsaĵfloro estis aĉetita ĉe floristo, eble por esti pinglita al balrobo. Kiel modestaj kaj malmultekostaj estis tiuj taftaj aŭ *Broderie Anglaise*-aj aferoj. Neniu profunde dekoltita ĉifonaĵo por ni. Ni zorge tenis nian virgecon. (Nu, almenŭ la plimulto el ni...) Fariĝi edzino kaj naski infanojn estis la ĉefa celo (La vindotukojn boligitajn en la kaldrono ni reuzis ĝis la bebo ne plu bezonis ilin, kaj poste konservis por la eventuale onta karulo.) Neniu kiun ni konis estis riĉa, sed neniu mizeris. Ankoraŭ ne venis la epoko de "Avareco estas Bona".

Ĉu ili estis la Bonaj Malnovaj Tagoj? Multeflanke, jes. Ni estis relative senkulpaĵ, afablaj, bonkoraj. Deprimo, precipe inter junuloj, ne ekzistis. Nek stratbuboj. Nek senhejmeco. Nek junul-memmortigo. Ha, nostalgio.

Ĝi estis ankaŭ epoko kiam ni lernis nenion pri la historio kaj la malfeliĉa stato de la unuaj Aŭstralianoj. Kiam la kuirado ankoraŭ estis netuŝita de internaciaj influoj. Kiam la dua-ranga genro enspezis konsiderinde malpli por la sama laboro. Kiam la infano kiu sin trovis ekster la seksprefera "normo" suferis turmentegon. Kiam, neimag-eble, geinfanoj estis sekse kaj alimaniere misuzataj ĝuste de tiuj kiuj devus ilin tenere prizorgi. Ĝi estis tempo de fumado kaj silikozo – ĉilasta kun minimuma aŭ nenia monkompenso. (Tiom da bierejoj. Ĉu ili vere rolis kiel lokoj por ĝojiga amikeco, aŭ kiel antidoto por kvieta aŭ brua malespero?)

Pli granda konscio pri la homa potencialo ankoraŭ atendis la onton. Kono kaj aprezo de aliaj religioj kaj kultimoj ankaŭ. Mizero kaj malegaleco en la mondo ne tuŝis nin. La vortoj *me-*

diologio kaj *ekologio* ne ekzistis en nia leksikono. La Verda Zono ja estis establita ĉirkaŭ la du orkampaĵoj, kiam finfine estis klare kial ni spertis tiujn nekredablajn polvoŝtormojn. Kiom da specioj ekzistis tiam, kiuj ne ekzistas nun! La rompiĝo de la natura medio, kondukanta al senprecedentaj grandskalaj ŝanĝoj en la klimato kaj epidemiologio jam komenciĝis, sed, escepte pri la poliomiĵelita alarmo okazinta kelkajn jarojn antaŭe, ni estis sensciaj pri tiuj ŝanĝoj, kaj pri iliaj sekvoj. La ter-eksaliĝo jam estis komencinta sian disvastiĝon, sed ni restis senkonsciaj. Ni ankaŭ ne rimarkis, ke la elŝirudehaku-pafu-forĵetu-pensmaniero (mensmanko!) kiu kaŭzis aĉiĝon de sektero kaj oceano jam estis kun ni. (Kaj ni certe ne ĝenis nin pri astroida harmagedono!)

Politike, la unua civila terorismo jam okazis en Palestino, la unua koncentrejo jam de longe estis okazigita en Sud-Afriko, la Kurdoj jam estis gasatakitaj en kio nun estas norda Irako. (Mi lasos al vi, kara leganto, elkovri la fifarantojn.) Kaj, kompreneble, la Atombombo jam estis kreita kaj uzita. Ankoraŭ restis granda, rozruĝa areo sur la mondmapo (la patologio de koloniismo!) kaj ni kantis: "La Dio Savu Nian Reĝon". (Respubliko Aŭstralia? Frenezaĵo!)

Kaj jen ni. Kvindek mallongajn jarojn (la biblian palpebrumon) poste. Mi rekuniĝis kun miaj klasanoj en aŭgusto. Spirite, preskaŭ nenia ŝanĝo! Fizike, nu tio estas alia afero. Kompreneble ni ĉiuj montras la cikatrojn de la diversaj vivospertoj.

Tamen, ni ankoraŭ vivas!

Se miaj supraj meditoj vekas similajn (aŭ malajn) memorojn en vi, eble vi ankaŭ porĉiame senmortigos ilin en venontaj *EN*-numeroj.

□

Nokto da turmento


de Franciska Toubale



Franciska Toubale

zercoj de la tago.

“Trejniĝi kiel aktoro estas streĉe kaj por la korpo kaj por la menso. Tamen morgaŭ mi devos esti freŝa kaj vigla, mi ekstaru kaj pretigu min por enlitiĝi.” Survoje al mia dormoĉambro, la komputilo kvazaŭ vokas min. “Aĥ, mi devas kontroli mian leterkeston! Tio estas rapida ago.”



min ke jam sonis la noktomezo. Ankoraufoje mi falis en la kaptilon de la moderna teknologio. Mi malŝaltu la maŝinon kaj iru por dormi. Mekanike mi direktas min al la kuirejo kaj malfermas la ŝrankon.

“Kio!!! Ne plu estas pano! nekred-eble!”, mi laŭtege ekkrias. Mia kunulo Karlo, aŭdante nur la panikon en mia voĉo, alkuras al mi, duonvekite, por enketi pri la kialo de mia emocio. Mi povas nur ripeti kun angoro: “Ne estas pano! Ne estas pano!”

Sen unu vorto, Karlo vestas sin. Li estis malfermanta la enirpordon, kiam

“Kia tago!”, mi pensas, alveninte hejme kaj ekfalante en la sofona de la salono. Dum mi ripozas, repasas en mia memoro la diversaj ek-

Sur la tegmento la kurado de falangeroj, regulaj kiel horloĝoj, konsciigas

mi demandis per tremanta voĉo:

“Kien vi iras?”

“Aĉeti panon.”

“Je tiu horo?”

“Mi kulpas. Mi uzis pli ol atendite, ĉar mia rostpano bruliĝis kaj mi forgesis pri tio.”

Antaŭ ol mi povas reagi, li estas jam for. Nun mi ne plu sentas la emon dormi. Mi hontas. Kial mi kriis kiel frenezulino? Kial manko de pano ĉiam kaŭzas al mi tiun senton de nesekureco? Certe kiel en ĉiu infano de mia generacio, la adoltoj enstamfis en mi respekton al pano. Ĉu pro la influo de la religio? La pano de la Diservo simbolicigas la korpon de Jesuo, eĉ la malpiuloj tion scias. Kiel ignori la katolikajn dogmojn en lando, kie kalvarioj¹ troviĝas je ĉiu kruciĝo de la vojoj? Eĉ tiuj, kiuj forjetis la kredojn de la prauloj, faras, laŭ la tradicio, krucon sur la plata parto de la pano per tranĉilo antaŭ ol enprofundi ĝin en la bulon. Ĉu la sento ke pano estas gravega pravigis ĝian sanktecon? Sendube ĝi daŭre estis grava ero de la dieto. Nur la riĉuloj kapablis satmanĝi sen gluti grandan kvanton da pano. Nun la junuloj ne povas imagi ke iam kokaĵo estis malofta festa plado. Fruktoj kaj legomoj ne estis abunde venigitaj el ekzotaj landoj. La vintra menuo estis tre monotona. Tamen neniam en mia vivo mi malsatis, eĉ dum la milito. Aŭ ĉu mi estis tro juna por ke tio lasu

1. “Monumenta kruco kun statuo de Jesuo krucumita, ĉe la kruciĝo de vojoj”. (NPTV). —

Ⓜ

konsciajn spurojn en mia memoro?

Mi sentas min ege malkomforta, ne nur pro mia ridinda konduto, sed ankaŭ pro tio ke mi ĝenis Karlon. Ĉu ĉiu homo ne meritas serenajn ripozon?

Dum mi atendas lin, mia menso vagas, provante trovi racian klarigon por neracia konduto... Kaj aŭdiĝas rulado de radoj pli kaj pli malrapida, klakado

de aŭtopordo. Li revenas!! Heziteme, mi paŝas al li renkonte. Per sia rideto kaj etenditaj brakoj, li mesaĝas ke li tute ne sentas rankoron, li bone komprenas. Ni brakumas unu la alian. La mildan varmecon de lia kontakto forigas miajn dubojn. Nun ni povas dormi. Ĉio estos en ordo. □



Lau mia vidpunkto



de Marcel Leereveld

Esperanto, kiel aliaj lingvoj, havas en la skriba lingvo indikilojn por karakterigi la sonojn de kelkaj literoj. Ili estas nur du: $\hat{\text{a}}$ kaj $\check{\text{a}}$. Ili formas la ĉapelitajn literojn kaj ne indikas altecon aŭ fortecon (akcenton) de la sono. En la sama kategorio troviĝas la negativa indikilo ' (apostrofo) kiu diras, ke oni ne prononcu la finan sonon *o* (aŭ *a* en "la") ĝi do reprezentas nur la signifon de tiu vortfina litero. Ankaŭ la punkto povas havi tiun funkcion: en grupo de literoj (d.ro) aŭ fine de unu litero aŭ grupo de literoj (*ekz. ktp. k.*). La punkto indikas, ke en la parola lingvo (kaj por la signifo) devas ĉeesti konataj literoj mankantaj en la skriba vorto.¹

Ekzistas ankaŭ matematikaj simboloj, kiujn oni en la parola lingvo prononcas kiel vortojn: $+$ = *plus*, $>$ = *pligrandas ol*. Kelkaj tiaj indikiloj

reprezentas nematematikajn vortojn kiel la steleto *.

Fine ekzistas lingvaj indikiloj, kiuj ká dividivas la fluon de vortoj (bildoj) en prepoziciojn kaj en subprepoziciojn, ká samtempe indikas la altecon de la voĉo kaj ĝian fortecon (akcenton). Ili nomiĝas la interpunkcioj, kaj entenas la punkton (.), la komon (,), la punktokomon (;), la dupunkton (:), la krisignon (!), la demandosignon (?), la tripunkton (...), la haltostrekon (—), la citilojn (" "), krampojn (/ /), parentezon (()), kaj steleton (*), kaj la dividstreketon (-) kiu uziĝas interne de vortoj, dum la aliaj menciitaj ne troviĝas en vortoj (por la alia funkcio de la punkto, vidu ĉi supre).

Alia signo por indiki la sonaltecon kaj sonfortecon (akcenton) de speciala vorto (aŭ de ĝia antaŭlasta silabo) estas la signo $\acute{\text{a}}$ sur kelkaj duoblaj konjuncioj, kiu helpeme montras ne nur tiun sonakcenton, sed krome la specialajn signifon kaj funkcion de tia vorto (kiu sen la indikilo $\acute{\text{a}}$ simple al-

1. $\acute{\text{a}}$ Sed ne ĉiam. Kiam ĝi anstataŭas finan *o* aŭ *a* oni prononcas sen tiu anstataŭata sono. Oni parolas *hom'* kiel *hom*, kaj de *l'* kiel *del*. — □

donas aŭ subtrahas vorton aŭ frazon al respektive for de la antaŭe menciita vorto aŭ frazo: *la patro aŭ la filo*.) La interpunkcio ´ indikas unue, ke la vorto diriĝas kun nenormalaj forteco (akcento) kaj alteco (pli alta ol la ĉirkaŭaj vortoj), kaj due ke la parto post la unua konjunkcio ne aldoniĝas al iu vorto aŭ frazo menciita antaŭ tiu unua konjunkcio (kiu estas normala sen la signo).

En la parola lingvo ni aŭtomate uzas la nenormalan akcenton, kaj en la skriba lingvo la indikilo ´ igas nin legi aŭ laŭtlegi la vortojn nenormale sed ĝuste. Sen tiu indikilo ni ne scias ĉu akcenti aŭ ne la konjunkcion antaŭ ol ni jam estas dirintaj la reston de la frazaro.

Kelkaj esperantologoj malĝuste opinias, ke ni ne rajtas uzi tiun indikilon, ĉar en kelkaj lingvoj (franca, kaj kelkaj slavaj) tiu signo uzatas por indiki specialan sonon kaj literon. Ili malpravas, unue ĉar en aliaj lingvoj (hispana kaj ĝermanaj) tiu signo ´ ne indikas specialajn literojn (per sonkoloroj), sed uzatas por sonforte kaj -alteco; kaj due ĉar ankaŭ en Esperanto tiu signo ne indikas sonkoloron, specialan literon. Tiu indikilo ´ sur la duoblaj konjunkcioj (kaj kelkfoje sur iu alia vorto por indiki nenormalan sonfortecon) havas do parte la saman funkcion kiel la aliaj interpunkcioj, kaj estas same utila.

Jen ekzemplo: “Ni vidis en la bestoĝardeno plurajn sovaĝajn bestojn, kaj multe da patrinaj, kaj multe da infanoj, evidente ĝuis la viziton.” Antaŭ ol legi la vorton “ĝuis” ni ne scias, ke ni devas legi la frazon kun akcento (pli forta kaj alta tono) sur la vortoj “kaj”, kaj sekve ni devas ripeti “kaj multe da

patrinaj kaj multe da infanoj” por ĝuste legi la frazon. Bonŝance ni povas uzi la akcentilon ´ por eviti tempo-perdon kaj embarason, tuj ĝustetone legante la frazon: “Ni en la bestoĝardeno vidis plurajn sovaĝajn bestojn, kaj multe da patrinaj, kaj multe da infanoj, evidente ĝuis la viziton.”

Ankaŭ vidu la signifodiferencon inter “Ni pasigis la tempon manĝante, aŭ parolante pri niaj ferioj, aŭ aŭskultante la televidajn novaĵojn”, en kio ni *ne* manĝis dum ni parolis kaj dum ni aŭskultis, kaj la sama sed kun indikiloj: “Ni pasigis la tempon manĝante, aŭ parolante pri niaj ferioj, aŭ aŭskultante la televidajn novaĵojn”, en kio ni manĝis dum ni parolis pri niaj ferioj kaj dum ni aŭskultis la televidajn novaĵojn. En ambaŭ frazoj ni parolis kaj aŭskultis ne samtempe. Do la signo ´ ne nur faciligas la (laŭt)-legadon de tekstoj, sed ankaŭ kelkfoje malebligas miskomprenojn.

Jen simila signifodiferenco per la uzo de la akcentilo sur la vorto “pli”:

1) *Ili rifuzis malŝarĝi [pli ol 50 sakojn da tritiko]*, kie ili ne malŝarĝis la ± 55 sakojn sur la ŝipo, kaj

2) *Ili rifuzis malŝarĝi pli ol [50 sakojn da tritiko]*, kie ili malŝarĝis 50 sakojn, sed ne pli. En la parola lingvo la signifodiferenco montriĝas per la pli forta kaj pli alta tono sur “pli” en la dua frazo (kaj pli forta tono sur “50” en la unua frazo).

Ĉar, kontraŭe al “kaj” kaj “aŭ”, la vortoj “kaj” kaj “aŭ” havas adverban funkcion, ili povas enkonduki la refleksivon en iu ajn frazparto: “Ni aplaudas ilian elektadon ante kaj *sian* estraron kaj *sian* prezidonton”, kaj “Ni konsideris lin (esti) kaj *sia* propra sekretario, kaj *sia* propra kasisto.

Komento de la redaktoro

Kiel Marcel indikis, multaj esperantologoj oponas la uzadon de la supersigno por tiuj celoj: parte ĉar ĝi ne estas en la *Fundamento*, kaj parte ĉar ili ne opinias ĝin bezonata.

Mi mem emas al vidpunkto meze inter Marcel kaj la oponantoj. Mi ne ŝatas la aspekton de vortoj kiaj *káj* kaj *áŭ*, eĉ kvankam ili laŭsupoze agas kiel interpunkciaĵo; kaj, laŭ mia opinio, ilia ĉefa valoro jam estas tradicie indikata per specialaj preslitteroj: *kursivoj*, laŭ preskaŭ ĉiuj preskutimoj nuntempaj, (**dikaj literoj** laŭ iamaj pres-kutimoj; kaj ĝis post la dua mondmilito per **larĝaj spacoj inter literoj**, sistemo uzita en la german-lingve influitaj landoj). Sed ekde la uzado de komputiloj por presitaj tekstoj la mondo interakordiĝis pri uzado de *kursivoj* kaj/aŭ dikaj literoj.

Preskaŭ ĉiam, kiam mi kompostas verkojn de Marcel, liaj *káj* kaj *áŭ* adekvate reprezentigaĵas per simplaj kursivaj *káj* kaj *áŭ*.

Parte kaŭzas problemojn por Marcel lia uzado de komoj. Se li skribus, ekzemple: “Ni vidis en la besto-ĝardeno plurajn sovaĝajn bestojn, kaj multe da patrinoj kaj multe da infanoj evidente ĝuis la viziton” neniu konfuzo ekestiĝus. Problemas lia ekstra komo antaŭ “kaj multe da infanoj” (kaj ankaŭ multe pli kutime estus skribi “kaj multaj patrinoj kaj infanoj evidente ĝuis la viziton”).

En “Ni pasigis la tempon manĝante, aŭ parolante pri niaj ferioj, aŭ aŭskultante la televidajn novaĵojn” malpli konfuzo estus skribi “Ni pasigis la tempon per manĝado, dum kiu ni paroladis pri niaj ferioj aŭ aŭskultadis la televidajn novaĵojn”.

Nu, pri tiaj aferoj oni povas diskuti kaj disputi; kaj mi ne deziras malfermi senfinan debatadon pri tiaĵoj en ĉi tiuj paĝoj. Laŭ nia kompostosistemo mi plu anstataŭigos la marcelajn *káj* kaj *áŭ* per kursivaj *kaj* kaj *aŭ*. Tamen, niaj legantoj rajtas scii pri liaj preferoj.

El la sekretario

Provizora tagordo de la Ordinara Ĝenerala Jarkunveno okazante lundon, la 19a de januaro 2004 ĝis dimanĉo la 25a ĉe la Uniting Church Conference Centre, 24 Beaconsfield Street Margate Beach, Queensland 4019.

1. Ĉeestantoj/pardonpetoj
2. Protokolo de la jarkunveno 2003 (jam aperigita en ESK)
3. Jarraporto
4. Financa raporto
5. Elektaj: prezidanto kaj estraro (no-

moj de nomumotoj al la Sekretario antaŭ la 1a de decembro)

6. Aferoj diskutindaj, inkl....
7. Proksimuma dato de la Ordinara Ĝenerala Jarkunveno 2005.

Ni atendas viajn kontribuojn por la tagordo. Bonvolu kontakti John Gallagher-on se vi havas ion ajn diskultindan por enmeto en la tagordon.

81 Lalla Road, Lillydale Tas 7268
abcetc@ozemail.com



Interrete



- Radio 3ZZZ: la ĝusta ret-URLo estas www.3zzz.com.au. La adreso al kiu vi sendu kontribuojn por la esperanta programo estas steveskant@hotmail.com.

Kiel jammenciite en la lasta numero de *EPK*, Radio 3ZZZ radikale ŝanĝis sian disvastigistemon per Interreto, tiel ke nun ĉiaj komputiloj povas facile kaj klare aŭdigi ĝin.

La esperanta programo nun bonege aŭdeblas per kaj Mac-komputiloj kaj PC-komputiloj, uzante RealAudio-n (kiu estas senpage elŝutebla ĉe www.real.com). Ĉiam ajn dum la semajno vi povas aŭskulti la esperantan programon, ĉe la ret-URLo donita supre.

Via redaktoro provaŭskultis por vi kun plezuro la sepdek-minutan esperantan programon originintan la 8an de septembro. Abundis muzikaĵoj — kantoj en Esperanto. (El ili la plejparto estis malnovstila.) La prononcado estis relative bona, kvankam kelkaj parolantoj emas forgesi akcenti la *i* en vortoj finiĝantaj per *io. ia*, kc. (Ekz. mi aŭdis *internacia* anstataŭ *internacia*, *hodiaŭ* anstataŭ *hodiaŭ*, eĉ *politika* anstataŭ *politika*, *iliaj* anstataŭ *iliaj*, *sámkiel* anstataŭ *samkiel*.)

Ni aŭdis diversaĵojn pri UEA, eĉ pri rasismo kontraste kun antisemitismo, priesperantaĵojn, ankaŭ erojn pri matematika vortaro, la desdamento en Rusio, kaj superstiĉoj.

Iom ĝenis la anglalingvaĵoj kiuj interrompis la fluon de la Esperantolingva programo; ankaŭ troa glorado de Esperanto.

Ekzistas diversaj esperantaj pro-

gramoj diverslandaj aŭskulteblaj per la reto; ĉi tiu estas inter la plej bonaj, rilate al sia varieco kaj ĝenerala intereso; kaj por ni en Aŭstralio, la diskutoj kaj novaĵoj el aliaj partoj de la mondo estas tre bonvenaj.

Mortis

Mi deziras raporti al vi kaj la aliaj la morton de Harold Paterson la 25an de septembro 2003.

Harold aŭdis pri Esperanto ĉirkaŭ 1990, kiam li respondis reklamon pri “Plenaĝa eduka kurso”, kiun Bill kaj mi intencis provi. Efektive, Bill kaj mi estis novaj esperantistoj, kiam Harold prezentis sin kaj ni trovis ke li estas instruisto de scienco, kio timigis nin. Sed Harold estis neniam aroganta, kaj li finis la kurson. Li devis veturi ĉiusemajne 1 ĝis 1.2 horojn, de Port Macquarie al Forster por la lecionoj, dum multaj jaroj.

Li ĉeestis kursojn kaj kongresojn en Sidnejo, Melburno, Brisbano. kaj Adelajdo, kaj krome la Universalan Kongreson en Adelajdo en 1997, kiun li partoprenis kun Lena, kiu tiam komencis lerni. La helpis al Alan Bishop dum tiu okazo.

Nian lingvon li ege amis. Efektive, mi kredas ke li kredis ke lerni la lingvon helpus la mondon ŝanĝi sian monsystemon, kiun li multe deziris ŝanĝi. Li verkadis artikolojn pri tio ĝis sia morto.

Malfeliĉe, Harold nun mankas al ni.

Betty Aulsebrook □

Internacia Esperanto-Muzeo translokiĝos

Malgraŭ gazetaj raportoj pri la malo, la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno fartas bone kaj kreskas. Ĉiujare la muzeo plenumas informpetojn de 2000 personoj el la tuta mondo. Jam ĉiuj libroj de la muzeo estas enkomputigitaj kaj troveblaj en la datumbanko¹ *Trovanto*². Nun oni enkomputiligas la gazetojn. Post kelkaj jaroj la muzeo ankaŭ ricevos novan oportunan ejon.

Nia pozicio en la Nacia Biblioteko estas forta. Internacia Esperanto-Muzeo neniam antaŭe tiom bone fartis. Ni plene povas plenumi ĉiujn niajn taskojn bibliotekajn, kaj krome pere de la Muzeo informas en unu jaro proksimume 2000 personojn el la tuta mondo en tre detala maniero pri Esperanto, tiel farante grandan servon al la Esperanto-movado,

diras la direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, Herbert Mayer.

Li refutas raportojn aperintajn antaŭ la somero³ en la Esperanto-gazetaro ke la muzeo estas endanĝerigita. En la julia statistiko pri la specialaj interretaj serĉiloj de la Aŭstria Nacia

Biblioteko, *Trovanto* estis je la unua fojo en la unua loko, konsultita 1078-foje. En junio *Trovanto* estis la malplej uzata inter la kvar retserĉiloj. La kresko povas esti rezulto de alvoko lanĉita de la muzeo. IEM havas plian bonan novaĵon:

- Estas nun definitive decidite, ke Internacia Esperanto-Muzeo translokiĝos. Tio okazos verŝajne en 2006 aŭ 2007, diras Mayer.


- Ni ne plu sidos en la kaŝita netrovebla grimpiga subtegmentejo, sed teretaĝe en Herrengasse, apud la Ministerio por Internaj Aferoj, do nur 200 metrojn for de la nuna loko.


Dank' al la translokiĝo la instituto baldaŭ staros sur pli firmaj piedoj. Post la gajno de tria laborposteno — ĝis 1995 laboris nur du en la Muzeo — nun ankaŭ la eksteraj cirkonstancoj definitive pliboniĝas je nivelo de moderna muzea teknologio.

- La ejoj ne estos grandaj, sed ĝuste novaj rimedoj ebligos al ni transdoni nian mesaĝon al la publiko multe pli adekvate ol nun en la malnovaj ejoj. Kaj kompreneble ankaŭ estos tute nova muzeo-koncepto, ĝojas Mayer.

En sia pli ol 70-jara ekzisto, la biblioteko de la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM) en Vieno daŭre ampleksiĝis kaj estas hodiaŭ la plej granda kolektaĵo pri Esperanto kaj interlingvistiko. Ĝi ankaŭ travivis la plej teruran periodon por Esperanto — la hitlerismon. Fondite en 1927, de Hugo Steiner, la kolekto por planlingvoj

1. *Databank* — 

2. *Trovanto* estas ankaŭ serĉilo. Kiam oni per Interreto venas al la adreso ..., oni renkontas ĉi tiun serĉilon, en kiu oni tajpas la nomojn serĉatajn. Vi povas trovi foton peri ĝi sur paĝo 16 de ĉi tiu numero de *ĜJK*. — 

3. En la norda hemisfero, do nia vintro. — 

fariĝis parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko en 1929. Pro spachezono la tuta muzeo denove translokiĝis en 1930 el ĉeval-stalo kaj monaĥ-ĉelo en la imperia palaco rekte en grandan salon-egon de Hofburg.

La enmarŝo de Hitler en Aŭstrion havis terurajn konsekvencojn por IEM. Esperanto iĝis malpermesita lingvo. Post trimonata aresto, IEM-fondinto Hugo Steiner liberiĝis kaj ĝustatempe sukcesis persvadi la koncernajn instancojn ne detrui la materialon de IEM, sed nur forpaki kaj meti ĝin en kelon. Speciale kruelan sorton suferis unu el la laborantoj en IEM: Gustav Weber estis mortturmentita en koncentrejo kelkajn tagojn antaŭ la liberigo de Aŭstrio en 1945.

Hodiaŭ la Internacia Esperanto-Muzeo posedas 25 000 volumojn, 2000 muzeajn objektojn, 2000 manskribaĵojn kaj manuskriptojn, 13 000 fotojn, 1100 afiŝojn kaj 40 000 flugfoliojn. Ili plejparte estas interrete troveblaj dank' al la programo *Trovanto*.

“Planlingvoj estas grava elemento kadre de la lingva kreivo de homoj. Ilin priskribas tiu sciencobranĉo, kiun ekde la unua duono de la 20-a jarcento oni nomas interlingvistiko. Post la unuaj provoj mezepokaj nur ekde la 16-a jarcento aperas la unuaj ellaboritaj planlingvoj. Ilia celo estis roli kiel instrumento de logika kaj filozofia pensado. Multaj gravaj personoj de la Eŭropa intelektularo okupiĝis pri la temo, i.a. Francis Bacon, Komenio (Jan A. Komensky, alinome Comenius), Kartezio (René Descartes) kaj Lejbnico (Gottfried W. Leibniz).

IEM rolas kiel muzeo, biblioteko, arkivejo, kaj estas la plej granda lingvistika libraro pri planlingvoj,”

klarigas la respondeculoj Christian Cimpa, Helga Farukuoye kaj Herbert Mayer. La instituto kolektas ankaŭ materialojn pri tute nekonvenciaj provoj solvi la lingvoproblemon, ekzemple per revivigo de klasikaj lingvoj.

“La modernaj komunikaj teknologioj proponas ankaŭ al malgrandaj lingvokomunumoj novajn eblojn: la latina fariĝis en Interreto denove tute vivoplena lingvo, same kiel ankaŭ la antikva greka, kiu neniam ĉesis roli kiel literatura lingvo tra la jarmiloj.”

Ankaŭ sur la tereno de la biblioteko la laboro progresas. Post la enkomputiligo de ĉiuj libroj kaj broŝuroj nun sekvas la gazetoj.

“Nia katalogo en Interreto, Trovanto, daŭre kreskas kaj enhance kaj laŭ teknologio.”

Proksimume fine de la jaro Trovanto baziĝos sur nova biblioteka sistemo, kiu estas tiu de la Aŭstria sciencaj bibliotekoj.

“Ni, la laborantoj en IEM, speciale ĝojas pro la fakto, ke en tempo, kiun multaj nomas kriza, nia instituto sukcesas kreski kaj fariĝi pli forta. Ne estante movada, IEM pere de sia informa laboro tamen daŭre helpas kaj subtenos la movadon.”

[Vidu bildon sur p.16 →]

[El *ret-info*] □



**POR RIDIGI
VIN**



“Ve, ho ve,” veas junulo, “mia dento dolor-egas!”

“Kiam mi havas dentodoloron,” diras al lia amiko, “mi ĉiam amoras kun mia amikino, kaj tuj la dentodoloro malaperas!”

“Bona ideo,” respondas la suferanto, “kie ŝi loĝas?”

[El *Tamen Plu*]

Datumbanka serĉmenuo

- [Enhavo de la datumbanko](#)
- [Ĝeneraj uzindikoj](#)
- [Serĉado per registroj](#)
- [Serĉado per logikaj kombinoj](#)

Serĉado per registroj

Deŝtu registrojn, indika la deziratan pozicion per entaĵo de la komencaj literaj (minusklaj), kaj indika la deziratan kvanton de linioj.

elekto de registro
 serĉnocio
 kvanto de linioj

Serĉado per logikaj kombinoj

Entaĵu po unu serĉnocio (minusklaj) en unu aŭ pluraj sekvantaj serĉkampoj kaj kombinu ilin per KAJ aŭ AŬ.

personoj [\(helpo\)](#)

1. titolo/slosilvorto [\(helpo\)](#)

2. titolo/slosilvorto [\(helpo\)](#)

3. titolo/slosilvorto [\(helpo\)](#)

loko, eldonejo, jaro [\(helpo\)](#)

dokumento [\(helpo\)](#)

logika kombino de la nocioj per: KAJ aŭ AŬ

farita la: 20.9.2003 je 3:14:33. lasta aktualigo: 23. julio 2003.

[Hejla Fariĵo](#)



Por Ridigi Vin



“Joĉjo, vekigu. Estas jam malfrue kaj vi devas iri al la lernejo.”

“Mi ne plu volas iri al la lernejo.”

“Neeble, vi devas iri.”

“Mi ne volas. La instruistoj malamas min, la gelnantoj ne volas alparoli min. Kial mi iru?”

“Ĉar vi estas la direktoro.” [El Ĝangalo]

“Kion ni faru hodiaŭ, karulo?”

“Nu, ni veturpromenu en la kamparo.”

“(Suspekteme): Kaj ĉu vi ne parkos en iu soleca aleo kaj provos min karesi, kisi, kaj t ielplui?”

(Moraleme): “Ho, tute ne!”

“Do, kial entute iri?” [El Ĝangalo]

En lernejo de paraŝutistoj, lernanto demandas la instruiston:

“Se mia paraŝuto ne malfermiĝos, kiom da tempo mi havos ĝis atingi la teron?”

“La tutan vivon.” [El Ĝangalo]



Skribas la Legantoj



Skribas Brendan Linnane

Dum miaj traserĉadoj de la interreto, mi trovis interesan citaĵon de Julio Cezaro.

Vive ergo moribus praeteritis, loquere verbis praesentibus atque id, quod a C. Caesare, excellentis ingenii ac prudentiae viro, in primo de analogia libro scriptum est, habe semper in memoria atque in pectore, ut "tamquam scopulum, sic fugias inauditum atque insolens verbum".

Mi uzis franclingvan tradukon por kompreni tion.

eh bien! forme tes mœurs sur celles des anciens, et parle la langue de ton époque; grave profondément dans ta mémoire le précepte que C.

César, cet esprit supérieur et juste, a examiné dans le premier livre de son traité sur l'Analogie: «Fuir une expression étrange et inusitée comme on évite un écueil.»

Ŝajnas al mi, ke ankaŭ Julio kontraŭis la enkondukon de nenecesaj novvortoj en la lingvon!

[Traduko:

Nu, establu viajn morojn surbaze de la antaŭuloj, kaj parolu la lingvon de via epoko; profunde gravuru en vian memoron la precepton kiun C. Cezaro, tiu supera kaj justa spirito, ekzamenis en la unua libro de sia studo pri Analogio: "Fuĝu de stranga kaj neuzita esprimo kiel oni evitas malmoral-aĵon. — ☐]



Deziras Korespondi



Jerzy S, uszniak, u. E. Orzeszkowej 42/8, 50-311 Wroc,aw, Pollando: Mi, esperantisto, serĉas korespondamikojn. Mi havas 55 jarojn kaj mi volas havi en via lando korespondamikojn, se estas ebleco.

Mia lingvaĵo ne estas tre bona, sed se mi havos korespondamikojn, eble mia Esperanto estos jam iomete bona.

Mi lernis la lingvon Esperanto hejme, tial mankas al mi konversacio, korespond-amikoj, leteroj, adresoj. ☐



Por Ridigi Vin



Jakobo: "Kie vi trovis tiun orhorloĝon?"
Jonatano: "Mi gajnis ĝin en kurkonkurso."
Jakobo: "Kiom da homoj partoprenis en la

kurkonkurso?"
Jonatano: "Nur tri. Policisto, la horloĝposedanto kaj mi!" [Tamen Plu]

Jom da blogo

de Gonçalo Neves

Blogo: ĉu nova vorto en Esperanto? Ĉu en Esperanto ni bezonas la vorton *blogo*?

Certe jes. Ĉar temas pri nova koncepto, nova maniero komuniki. Publikigi bloge signifas publikigi rapide kaj facile. Sen perantoj. Sen ĝenoj. Sen redaktoroj kaj re(d)akcioj. Sen cenzuroj. Libere. Ni do enkonduku ne nur la vorton blogo sed ankaŭ ĝian kompletan familion sufiksajn kaj prefiksajn: ni kreu blogojn, ni blogu kaj reblogu, ni reagu bloge, ni eniru blogojn kaj legu blogojn, kaj inter bloguloj regu blogo etiketo.

Entute do: “ĉu blogi aŭ ne blogi, tiel staras nun la demando,” iam vortis Blogspiro. La respondo senhezite estu: en la mondon venis nova blogo, nun de blogo flugu ni al blogo!

Mi esperas, ke vi ĉiuj globe kaj senblage kunblogos.

Nova epizodo en ĉapelujo

Cyberspaca krozo similas al arbara promeno. Acida bero ĉi tie, plej dolĉa frukto tie. Vepran densejon baldaŭ kompensas nuda placo. Mallumo alternas kun helo. Seka strobilo kontrastas kun musko humida.

Krozante tra la retejo de Ĝangalo mi alvenis al kurioza paĝo ellaborita de Steffen Eitner. Ĝi temas pri niaj ĉapeloj. Jes! ĉiam kaj ree kirlata objekto. Tamen ne ŝultrumu nek forfuĝu! Tiu ĉi aŭtoro pledas por nenio. Li volas nek ŝanĝi la alfabeton nek prediki avantaĝojn kaj meritojn de nova or-

trografio. Li simple faris admirindan ekzercon intelektan kaj grafikan, ŝpinante – novajn literojn!

Kion do li umis? Li studis grafike niajn ĉapelitojn, ilin tordis aŭ dishakis en pecetojn, kaj ĉi lastajn li rekirlis kaj kungluis, forĝante novajn signojn, kiuj iel – unuj pli bone ol la aliaj – elvokas ideon pri la aspekto kaj prononco de la originaj literoj. Ekzemple: por surrogati nian ĉapelitan g, li dishakis la literojn d kaj g, kaj la akiritajn fragmentojn li puzlis en novan signon, kiu similas al kunfandiĝo de la du antaŭaj.

Ĉĉ Ĝĝ Ĥĥ Ĵĵ Ŝŝ Ŭŭ

Ĉĉ Ĝĝ Ĥĥ Ĵĵ Ŝŝ Ŭŭ

Pleje mirfrapas ĉi-[ret]paĝe tio, ke la dishakiĝon de ĉiu litero kaj la kungluiĝon de ĉiuj pecetoj oni spektas poŝtupe kaj lantmove, kvazaŭ temus pri filmata operacio.

Ĉu indas tiaspecaj streboj? Nu, la propono de Eitner solvas absolute nenion. Nia ĉapelfamilio ankoraŭ ie-tie naskas grumblojn kaj teknikajn tuberojn, sed la proponata literaro nek dampas tiujn nek forfajlas ĉi lastajn. Mi tamen agnosku, ke lia laboro estas intelekte digna, grafike alloga kaj teknike impresa. Temas ja pri interesa kaj rigardinda kuriozaĵo.

La primitivuloj kaj nia tradicio

Ĉiu el vi certe konas, bilde aŭ filme, la rudimentan veston portatan de abo-



riĝenoj kaj alispecaj popoloj, kiujn ni, altnazaj “civilizitoj”, memfiere kaj malŝate nomas “primitivaj”. Temas pri eta peco, tuka, hara aŭ alispeca, kiu kovras la seksorganojn kaj ligiĝas al la korpo per du rimenoj aŭ ŝnuretoj, unu ĉirkaŭ la zono kaj la alia inter la gluteoj. Nu, eble ekzistas variantoj, laŭ la modo aŭ la rangoj, sed temas pri io tia. Ĝin oni nomas *tanga* en la portugala, *tapall* en la kataluna, *taparrabo(s)* en la hispana, *perizoma* en la itala, *pagne* en la franca kaj *loincloth* en la angla. Kiel nomi ĝin en Esperanto?

Nu, esperantaj “primitivuloj” ne ekzistas, kaj se ili tamen ekzistus, ili certe preferus porti kuloton kaj verdstelan T-ĉemizon. Ĝis nun ne aperis do – se ĵargoni civite – socia bezono por tia vorto. Tamen necesas nomi tiun pecon, kiam oni prelegas pri tiaj mizeruloj senaŭtaj kaj senkomputilaj, kiuj en arbara trankvilo lancas kaj sagas bestojn por regali la stomakon, anstataŭ maĉi saŭc-abundan hamburgeron en muziktondra vorejo ĉe civilizita stratangulo. Kion fari?

Al esperanto ĉiam venas homoj, kiuj okupiĝas pri ĉiaspecaj demandoj kaj ekvacioj. Inter ili mi nun menciuj la abunde dikan kaj vaste utilan *Esperanta Bildvortaro*-n, tradukitan el la germana de Rüdiger Eichholz, kiu en

1988 enmondiĝis en Kanado. Nu, ĝuste en tiun verkegon enŝteliĝis du “primitivulaj” bildoj montrantaj la menciitan “kaŝilon de hontidaĵoj”, kiun Eichholz tre simple kaj trafe tradukas per *zontuko*. Kio poste? Ĉar temas pri traduko simpla kaj trafa, kaj ĉar la simplon kaj trafon oni emas sekvi kaj imiti, aliaj vortaristoj – i.a. Carlo Minnaja – tiun proponon adeptis, adoptis kaj heredigis en siaj verkoj. Inter ili – por ke oni ne pensu, ke ĉi-lande ĉiuj dormas kaj pigras – mi menciuj ankaŭ la portugalan-esperantan vortaron de Almeida, kiu gratulinde enprenis la diritan vorton.

Tamen ne ĉiuj. La plej grava el ili, nia nepra kaj ankoraŭ senkonkura PIV, tiun vorton preterlasis en sia dua eldono, aperinta post Eichholz, post Almeida kaj post Minnaja. Fi kaj ve! Sed ne nur NPIV. Ankaŭ Fernando de Diego ĝin ignoras en sia ĵus naskita *Gran Diccionario de Español-Esperanto*. Anstataŭe li proponas la vorton *sekstolo* kiel tradukon de *taparrabo(s)*.

Tio signifas, ke inter 1988 kaj 2002/2003 rompiĝis fadeno. Ne unuafoje kaj eble ankaŭ ne lastfoje. Ofte okazas, ke niaj verkistoj kaj intelektuloj preferas reinventi la radon, anstataŭ ensalti la trajnon jam pli ol cent jarojn veturantan, al kiu alkupliĝas ĉiam novaj kaj pli moderne ekipitaj vagonoj. “Tradicio”. Kion *tradicio* signifas en la latina? Ĝuste tion, kion ni devus praktiki kaj kultivi ĉiutage: transdonaĵo. Transdono de pensoj, sentoj kaj precipe vortoj, kiuj transiras de generacio al generacio, kiuj transserpentas, kiuj sin transŝovas kaj transproponas al heredantoj kaj posteuloj.

Ni ne sufiĉe forte kaj entuziasme flegas nian tradicion. En polv-abundaj libroj, flaviĝintaj gazetoj kaj ink-avar-

aj raportoj – ĉie amasiĝas pensoperloj kaj vorttrezoroj neniam transdonitaj al postaj generacioj. Kaj ĉiam denove kaj refoje niaj pensuloj devas puŝi la sizifan ŝtonegon al suproj neniam atingotaj – neniam, ĝis la momento, kiam ni pli ofte kaj pli respektive decidus transturni tiujn malnovajn paĝojn

kaj aŭskulti la eĥon de nia historio.

Ĉu do ni agas tiel malprimitive? aŭ ĉu – domaĝe! – ni zontuke kovras ne la seksorganojn sed la okulojn?

[El *Periskopo*,
persona forumo de Gonçalo Neves
<http://periskope.blogspot.com/>] □

For the World's A B C's, He Makes 1's and O's

by Michael Erard

Michael Everson, a 40-year-old typographer who lives in Dublin, considers himself blessed because he has found his life's work: to be an alphabetician to all the peoples of the world. Mr. Everson's largest project to date – a contribution to a new version of Unicode 4.0, an international standard for computerizing text – is cementing his reputation.

His mission has taken him to Kabul, Afghanistan, and Helsinki, Finland; to Beijing, Tokyo and Redmond, Wash. His Dublin house is a shrine to his obsession with every writing system that humans are known to have created – 148 of which Mr. Everson says he can use for writing his name. In the hallway is an icon of the saints Cyril and Methodius (Cyril is often credited with inventing the Cyrillic alphabet) and a page from a Maghreb manuscript from North Africa.

He keeps a photo of a stone inscribed with ogham, an ancient Irish

alphabet that looks like hash marks, in a silver frame. His office chair, parked in front of a Macintosh G4 laptop named Cyril, is upholstered with dark blue fabric dotted with Egyptian hieroglyphics. Surrounding his desk are shelves heavy with books on the origins of cuneiform and other writing systems.

He remains fond of the Roman alphabet, however. "Of all the alphabets, it's the best one," he said in a telephone interview.

For the last 10 years, Mr. Everson, who has American and Irish citizenship, has played a crucial role in developing Unicode, which might be viewed as the computer age's Rosetta stone. Mr. Everson explains Unicode as "a big, giant font that is supposed to contain all the letters of all the alphabets of all the languages in the world."

A more technical explanation of Unicode is this: When Mr. Everson sends e-mail in ogham, his computer

isn't sending ogham letters through the ether. Instead, strings of 0's and 1's are transmitted, and when they arrive on a friend's computer, they generate on its screen the same ogham letters that Mr. Everson typed. Unicode is the master list that resides in both computers and translates individual letters and symbols into strings of 0's and 1's and back again. Most current software is Unicode-compliant, which means that this master list of all the world's writing systems has been built into operating systems, browsers and software.

The code assigned to all 96,000 characters is handled only by programmers in its naked form, while computer users (and sometimes vendors) install the specific fonts that represent a specific alphabet. A font renders a language readable to humans; Unicode renders a font readable to computers.

Most people don't even realize Unicode is at work. "Unicode is like plumbing," said Rick McGowan, the vice president of the Unicode Consortium. "Yet it's the most far-reaching and ambitious multilingual project in history."

It is because of Unicode that bloggers can muse in Arabic and domain names can exist in Chinese, or that National Security Agency analysts can scour the Internet for reports on the latest threats in East African newspapers. "Because of Unicode," Mr. McGowan said, "you can plunk down a vanilla off-the-shelf computer into a cafe anywhere in the world and have any user in any language walk up to it and use it for accessing the Web."

Mr. McGowan was a member of the group of computer scientists and lin-

guists who set out to create the system in 1990 to solve an emerging problem.

As a growing number of users wanted to write in their own languages on their machines, companies had developed methods for computerizing text that did not appear in the Roman alphabet. With the rise of the Internet, the problem became more complicated because there was no assurance that all those machines would be able to share text data. Without a shared standard, manufacturers and even governments were creating isolated islands of data, each with its own standard, and each computer would have to be customized to the writing system that the owner wanted to use. Many users could not write e-mail, build Web sites or search databases in their own languages and alphabets.

The solution was Unicode, an international standard for character encoding. (Character encoding is simply any system that transmits textual information; Morse code is one example.) Last month the latest version of the standard, Unicode Standard Version 4.0, was published. It contains encodings (that is, unique strings of 0's and 1's) for some 96,000 letters and symbols. Approximately 70,000 of them are Chinese characters. Unicode also contains support for 54 other writing systems, from Mongolian to Thai to Gothic to Cyrillic.

Mr. Everson said he had worked on about 5,000 of those characters. Version 4.0 includes characters for Linear B (for which he designed the font) and other ancient Mediterranean alphabets that are used mainly by scholars.

As vast as Version 4.0 seems, it is still not complete, and nearly 100 writing systems remain to be encoded.

Mr. Everson is haunted by the prospect that Unicode may never be finished. "Imagine how you would feel if your name was François, but there was no ê available," Mr. Everson said. "You would be irritated that your phone bill came addressed spelling your name wrong. Now imagine if your language used a totally different alphabet and you couldn't use computers at all because of it. It's a question of human rights, really."

An incomplete Unicode is a looming possibility, however. Now that the writing systems of the major computer markets are encoded, the computer companies that once backed the Unicode project are beginning to question the expense. To ensure that the remaining writing systems are included, a project named the Script Encoding Initiative has been set up at the University of California at Berkeley to enlist scholars and apply for funds from private foundations to hire Mr. Everson full time.

One result of the dwindling interest from the private sector is to put pressure on Mr. Everson to complete large projects. "They say, 'Here, Michael, can you do Egyptian?' It's like, no. Egyptian is on my list, Egyptian is hard, and it's big."

To pay the bills, Mr. Everson works as a typesetter. He is currently setting type for *Gargantua*, by Rabelais, in Irish. Other notable projects include the first publication of the entire *New Testament* in Cornish, as well as an English-Cornish dictionary.

But Mr. Everson admits that he is most drawn to the encoding work. "It's best for me in my life to be consumed by an obsession in writing systems, because I am extraordinarily well suit-

ed to dealing with it," he said.

Mr. Everson was first attracted to far-off places and languages by the books of J. R. R. Tolkien, which he first read as a 13-year-old living in Tucson. (Mr. Everson said he still has a "soft spot" for Tengwar, one of the alphabets that Tolkien invented for his made-up languages of Sindarin and Quenya.) *The Lord of the Rings* led him to Anglo-Saxon and the epic poem "Beowulf," which he decided to translate from Old English at the age of 14. From his copy of the "Beowulf" manuscript, he practiced copying Anglo-Saxon letters with a calligraphy pen.

Then he graduated to designing fonts on his Macintosh, tackling Georgian and Cyrillic, then Devanagari. After feeling dissatisfied with graduate school at U.C.L.A., he moved to Ireland in 1989 and began typesetting for a living while designing exotic fonts on the side for writing systems including Cherokee, ogham and Sinhala.

In 1993, he saw a request from the Unicode Consortium for revisions involving some archaic scripts, one of which was ogham. "It was like, ooh, this is Irish, let's look into it," Mr. Everson recalled. He also sent comments on Burmese, Ethiopic, Yi and Sinhala. "I started in early," he said. "I just plunged right in."

Meanwhile, at the Unicode offices in Silicon Valley, people were impressed with the work by this relative unknown in Ireland. Mr. McGowan remembers the first proposal he received from Mr. Everson, on a particular character in ogham. The first time they met, Mr. McGowan was so captivated by Mr. Everson's charm and erudition that he saved his name tag.

“Michael is a pretty special guy,” he said. “Also, he wrote the month with a Roman numeral. I thought that was amusing.”

Mr. Everson’s knowledge of the world’s writing systems has made him indispensable to Unicode. “At this point, Michael is probably the world’s leading expert in the computer encoding of scripts,” Mr. McGowan said. “Nobody else comes close to having his detailed knowledge about so many scripts and how they are, or should be, encoded.”

Deborah Anderson, a researcher in the linguistics department at Berkeley who heads the Script Encoding Initiative, credits Mr. Everson with getting most of the lesser-known writing systems into Unicode. His 220 proposals or technical documents, she said, make him “without question the single most prolific Unicode proposal author around.”

As exotic as the subject matter is, the work itself is fairly dry. It involves finding authoritative texts, assembling examples and seeking out experts and then working with them to determine how many characters there should be and how they should look.

“It’s one thing to be a specialist who reads Ugaritic,” Mr. Everson said. “It’s another to be a person who can figure out the essential bits of the writing system in terms of the way Unicode works.”

He takes a remarkably long view of the impact of his work. “There’s satisfaction in knowing that the work of analyzing and encoding these languages, once done, will never need to be done again,” he said. “This will be used for the next thousand years.”

Mr. Everson also seems to enjoy the

human interactions. He is proud of working with the grandson of Osman Yusuf Kaynandid, who invented the Osmanian script in Somalia in 1922. He also likes to tell about how he met the president of the Tibetan Calligraphy Society at a Unicode meeting in Copenhagen. Mr. Everson had helped the organization ensure that Tibetan was included in the standard. The president showed Mr. Everson how to write his name in Tibetan with a highlighter pen.

“He thanked me,” Mr. Everson said with reverence. “I couldn’t believe that, because his organization has been in existence for over a thousand years.”

Copyright 2003 The New York Times Company
From www.nytimes.com 2003/09/25 □



POR RIDIGI
VIN



“Mia kara, aminda...” komencis ŝi.
“Ĉu robon aŭ ĉapelon?” ageme in-
formiĝis li. [El *Eventoj*]

Mia frato estas stulta. Mi trovis lin
batanta sian kapon per granda martelo.
Li diris ke lia nova ĉapelo estas tro
granda, kaj tial li volis pligrandigi
sian kapon. [El *Tamen Plu*]

Dum la geografia leciono, la instru-
istino demandas:

“Joĉjo, donu al mi tri asertojn kiujn
pruvas: ‘La tero estas ronda’.”

Post cerbumi iomete, li respondas:

“Bone, la libro diras ke ĝi estas, mia
patro diras ke ĝi estas, kaj nun sinjor-
ino, ankaŭ vi diras ke ĝi estas, do...”

[El *Eventoj*]

Malĉeesta Instruado de Esperanto en Aŭstralio.

AEA-aj Korespondkursoj en Aŭstralio

Prezentita de la nuntempa administranto Hazel Green ĉe la UK en Svedio

Kompreneble, estas pli bone se lernanto de Esperanto povas ĉeesti klason, kaj konversacii kun instruisto kaj kunlernantoj. Sed tio ofte ne eblas, aparte en larĝa lando sen grandnombra loĝantaro, kia Aŭstralio. Do, antaŭ longa tempo la Aŭstralio Esperanto-Asocio (AEA) starigis korespondkursan servon, kaj nun estas mia tasko administri tiun servon.

Kiam oni demandas pri Esperanto per letero aŭ retmesaĝo, ni proponas kelkajn elektojn. Se klaso ne haveblas, mi proponas ke oni lernu per Interreto — tiuj kursoj estas pli modernaj, pli viglaj, pli amuzaj ol niaj perkorespondaj kursoj. (www.lernu.net, www.cursodeesperanto.com.br, esperanto.org/espviva). Kiom da aŭstralianoj lernas per Interreto, mi ne scias. Sed kelkaj homoj bezonas aŭ preferas perpapieran kurson. Por tiuj la AEA vendas 5 kursojn, de la plej simpla ĝis pli profunda.

La unua kurso, nomita *Bonan Tagon*, instruas per 12 simplaj lecionoj kun skribaj ekzercoj. La studento ricevas malgrandan vortaron, kaj sonbendon por ekzerci sin orele kaj buŝe.

Por la dua kurso ni uzas la sonbendon kaj libron *Jen nia mondo!* el Britio. Sur la sonbendo estas 12 konversacioj, kaj ĉiu ilustras kelkajn gramatikajn punktojn. La tria kurso uzas anglan libron *The Esperanto Teacher* (La Esperanto-instruisto). Aŭstraliano John Moore verkis pluajn klarigojn kaj tradukekzercojn por ĉiu el la 20 lecionoj. La aĉetinto ne ricevas sonbendon, sed ricevas pli grandan vortaron kun

tiu kurso.

Por la kvara kurso ni uzas *The Progressive Course* (La progresiga kurso) kun lernolibro de Butler, *Step by Step in Esperanto* (Paŝon post paŝo en Esperanto).

La kvina kurso, la sola kiu ne uzas la anglan, estas *Paŝoj al plena posedo* de William Auld — nur la unuaj dek kvin paŝoj.

La kursoj restas iom malaltkostaj, ĉar la servo tenas grandan stokon da malnovaj ekzempleroj, sed por tiuj kiuj volas pagi neniom, estas ankaŭ senkosta perpoŝta kurso.

La plej valora parto de la korespondkursa servo estas la kursgvidantoj, kiuj korektas ekzercojn, respondas al demandoj, kaj kuraĝigas. Mi penas ligi studenton kun kurshelpanto en la sama provinco, kaj esperas ke ili povas vere renkonti unu la alian, verŝajne nur malofte.

Vi ĉiuj scias, ke por lerni lingvon, absolute necesas malfermi la buŝon. Tio povas esti problemo por korespondaj studentoj. Ni petas ilin imiti la sonbendojn, telefoni al alia kursgvidanto se ili volas, renkonti esperantistojn kiam ajn eblas, kaj se homoj ne helpas, almenaŭ paroli esperante kun la kato.

Mi vendas nur malmultajn kursojn: inter 7 kaj 25 en jaro, kaj eble duono aŭ malpli de la aĉetintaj finas la kursojn. Do, niaj korespondaj kursoj ne venkos la mondon por Esperanto. Tamen, ili estas utilaj, ĉar ili donas rimedon por tuj komenci lerni, al tiuj kiuj interesigas. [El *Teloepo*] □

Odlo Bokserp: Liaj paĝoj

Multaj miaj legantoj petis min skribi pri miaj persona historio, elstara genealogio, historiaj aventuroj, parencoj kaj neparencoj, kaj aliaj detaloj kiuj influis la disvolviĝon de la presarto, kiel ankaŭ de la pingvena esperantismo. Anstataŭ mem laŭdi min, mi decidis lasi tion al nia plejamata plejestiminda Reaktoro, kiu bon(ĉu?)vole intervjuis min por ĉi tiu revuo. Do, jen:

Re.: La plej ofta demando de niaj legantoj estas: kiam kaj kiel vi fariĝis pingveno. Nepre ekspliku.

OB: Nu, efektive temas pri vere fascina historio. Kiel vi bone scias, origine

mi estis ne pingveno sed koboldo. Koboldo estas fikciulo, kaj ne havas korpan formon. Sed jam kiam mi estis nur bebeto, min interesis ne nur la fikcio sed ankaŭ la malfikcio, kaj mi komencis babiladi pri la malfikciaĵoj de la mondo. Miaj gepatroj kompreneble ne komprenis min — tiaj estas la gepatroj de babilemaj etaj beboj jam de eterne — do ili plu traktadis min fikcie, kio por koboldo estas ne tre saniga.

Por mia tricenta naskiĝdatreveno, miaj gepatroj donacis al mi remburitan pupon en la formo de pingveno — kutima donaco por tiel juna bebo kia

Famaj neparencoj de Odlo Bokserp

Trim

Trim estis fama brita esploristo, (1799-1804), kiu en 1801-1803 ĉirkaŭvelis Aŭstralion, akompanate de sia fidela dorlothomo Matthew Flinders. Dum ĉi tiu vojaĝo, Trim esploris, nombris, kaj karesis la krurojn de multaj indiĝenoj, kiuj lin nomis la plej afabla eŭropano kiun ĝis tiam ili renkontis. Li ankaŭ renkontis multajn pingvenojn. Ĉar li estis respondeca pri la oficialaj raportoj pri la nova kontinento, Trim zorge korektis kaj piedpremis la mapojn kiuj poste fariĝis normaj por la tiamaj atlasoj de la mondo. Oficiala portretstatuo de Trim troviĝas antaŭ la Biblioteko Mitchell en Sidnejo. La foto ĉimaldekstra estas el lia aŭtobiografio *Trim*, ilustrita de Annette Macarthur-Onslow. Angus & Robertson eldonis ĝin (kvankam ili erare nomis la aŭtoron Matthew Flinders).



mi. Mi multe ĝuis la ludadon per ĝi, suĉis ĝiajn krurojn, mordis ĝiajn orelojn, premis ĝin al mia brusto, kaj ploregis kiam mia patrino insistis maŝinlavi ĝin. Mi ankoraŭ havas ĝin, kaj ĝi dormas kun mi apud mia kapo ĉiunokte.

Plejgrave, mi sciis ke pingvenoj *ne* estas fikciaj, kaj mi decidis, jam tiam, estiĝi vera pingveno. (Vi eble iam legis pri alia fama kazo, tiu de juna ligna pupo kiu volegis fariĝi vera homo. Kiam mi poste tralegis tiun historion, mi tuj ekrekonis la similecon de la situacioj de li kaj mi.)

Re: Jes, mi komprenas tion. Sed kiel vi *efektivigis* tiun transformiĝon.

OB: Pardonu — vi demandis al mi, kaj mi volas kompletigi mian respondon.

Re: Jes, sed...

OB: Do mi daŭrigas. — Unu tagon, dum mi estis en la infanĝardeno, mi decidis desegni mian idealon: pingvenon. Nia instruistino multe laŭdis mian desegnaĵon, kaj pinglis ĝin al la afiŝtabulo, apud la aliaj majstroverkoj de la infanĝardenanoj.



Tiu desegnaĵo fariĝis klasika, kaj nun kuŝas en subkelo de la fama muzeo Louvre en Parizo.

Multajn jarmilojn poste la fama franca aŭtoro Anatole France vidis mian desegnaĵon en la Muzeo Louvre, kaj diris “Ĝi similegas al verko de mia

propra trijarulino!”

Ankaŭ la fama preparolisto David Attenbourough flustris pri ĝi: “Nu! Jen!”

Re: Vi diris ke Anatole France komparis vin kun sia trijarulineto. Ĉu do vi estis knabineto?

OB: Tiutempe jes. Poste, kiam mi fariĝis pingveno, nu, ne eblas distingi inter knabaj kaj knabinaj pingvenoj, sciu. Nur ili mem scias al kiu sekso ili apartenas. Kaj ankaŭ ne ili, dum sia infaneco. Nek la gepatroj, efektive.

Re: Kaj vi?

OB: Tiun sekreton mi promesis kaŝi, kiam mi pingveniĝis.

Re: Kaj kiel kaj kiam tio okazis?

OB: Mi ja rakontas al vi. Aŭskultu!

Unu tagon, kiam mi estis gimnaziano, necesis ke mi akiru laborsperton, kiel kutimas en la trimila jaro de gimnazistudado. Mi elektis sperti la artverkistadon en Aŭstralio, kiu tiutempe estis ankoraŭ parto de la Eŭrop-Azi-Oceania kontinento.

(*Daŭrigota*)

Speciala Noto pri nia senlerna Redaktoro

Kiu legis zorge la septembro-oktobran numero de *ELK* sendube rimarkis ke nia Reaktoro tute ne scias simplan elementan arismetikon! Li plombe kaj senhonte anoncis ke la 8 titololoj listitaj sur paĝo 15 sumiĝas al 10! (Kaj li plifuŝagis dirante, sur paĝo 2, ke tiu listo troveblas sur paĝo 16!) Nu, jes, ke li malsukcesis en la jarfinekzameno en la infanĝardeno, tion ni jam ĉiuj sciis. Sed eĉ *mi* scias ke 8 ne egalas al 10 (escepte de en februaro, kaj en ĉiu jarmilo kiu ne divideblas per 4). Nu, fi!

Indekso 2003

61 = januaro-februaro

62 = marto-aprilo

63 = majo-junio

64 = julio-aŭgusto

65 = septembro-oktobro

66 = novembro-decembro

AEA Auditor's Report 62/26

AEA kaj NZEA Kongresoj:

2003 AEA: intervjuoj kun instruistoj de la somerlernejo (Terry Manley) 61/16

2003 AEA: La 19-a aŭstralia somerkursaro de Esperanto — raportoj (Terry Manley, Tamen Plu, Franciska Toubale) 62/5

2003 AEA: Fotoj el la somerlernejo 63/6

2003 AEA: Kongresraportoj 62/10

2003 AEA: Protokolo de la Kongreso 2003, kc.

2003 NZEA: Antaŭanonco 61/15

2003 NZEA: Raporto de Franciska Toubale 64/8

2003 NZEA: Kongreso 2003 en Christchurch Nov-Zelando — raportoj de Donald Rogers kaj Ross Moore 64/25

2004 AEA-NZEA: Antaŭanonco 64/6

2004 AEA-NZEA: Antaŭinformoj 65/6

2004 AEA-NZEA: Ĝisdata novaĵo pri la komuna kongreso de AEA/NZEA (Kay Pattersen) 66/5

2004 AEA-jarkunveno 66/12

Artikoloj:

...Kun Esperanto vi estas amiko (Horvath Sandor)

Aventuroj en Belgujo (Jonathan Moylan) 65/5

Esperanto en Tianjin-a Fremdlingva Universitato (Han Zuwu) 65/19

Internacia Esperanto-Muzeo trans-

loĝiĝos 65/15

Iom da blogo (Gonçalo Neves) 66/17
Karuselo en formo kaj koloro — pri Alida Leereveld (Franciska Toubale) 64/7

La 51a Kansai Esperanta Kongreso (Dianne Lukes) 65/20

La eskapinta esperantisto (Rosalie Schultz) 65/9

Malĉeestas instruado de Esperanto en Aŭstralio (Hazel Green) 66/25

Mia rondiro en la suda insulo de Novzelando (Franciska Toubale) 64/10

Pasko kun bilbioj (Hazel Green) 65/3

Post 50 jaroj (Vera Payne) 66/8

SARS maltrankviligas kongresanojn de UK 2004 65/22

Vere, la ŝtonoj parolas (Henriko Broadbent) 65/25

Deziras Korespondi: 62/15, 63/14, 66/18

Diversaĵoj:

Danko de Jenny Bishop 62/12

Edziniĝis Penny Vos 64/15, 65/4

Fabelkonkurso por infanoj 64/15

ILEI dankas pro helpo al Afriko 63/8

Infanaj desegnoj pretitaj por Francio 62/11

La 94a mondkongreso de Rotario 64/19

Libroservo de AEA 64/29

Liro-2003 64/20 Mesaĝo de Jennifer Bishop — pri Afriko 62/15

Monda Turismo bankrotis 62/13
National Languages Conference
Oct. 2002 62/13
Naturista vivo 64/15
New Zealand Book Purchasers 65/
10
Nova filmo 62/13
Nova gazeto Enigma 63/7
Persa-esperanta revuo en Irano 62/
11
Radio 3ZZZ 65/8

Ekzamenoj:

Alvoko (Marcel Leereveld) 64/16
Ekzamenrezultoj 61/26, 62/10
La ses diversnivelaĵoj ekzamenoj en
Aŭstralio (Marcel Leereveld)
61/25

El la regionoj: 63/28

Esperantaj eventoj:

Pri la Universala Kongreso de Es-
peranto en Gotenburgo (Bob
Felby) 66/3
Vintraĵoj: la 75a kongreso de
S.A.T., Vizito al la londona klu-
bo, La 3a azia kongreso (Fran-
ciska Toubale) 61/13

For the Beginner:

Adjectives (Donald Broadribb) 62/
20
Differences between English and
Esperanto (Donald Broadribb)
65/11
First-Day Covers from Croatia
(Donald Broadribb) 63/14
For the World's ABC's he makes 1's
and 0's (Michael Erard) 66/21
Ĝis, da, de, po, kiel (Donald Broad-
ribb) 63/11
Is varma hot or warm in English?
(Brendan Linnane) 61/22
The Ethical Side of Esperanto (Kep
Enderby) 62/21
The Internet and Esperanto
(Donald Broadribb) 62/19

Name the objects (Donald Broad-
ribb) 64/21
The Simple Uses of si and sia
(Donald Broadribb) 65/12
"Times" (Donald Broadribb) 65/13
When to use the word si? (Donald
Broadribb) 64/24

Interrete:

Accented Letters 65/18
Astronomia Esperanto-terminaro
63/7
Bibliografio de vortaroj 64/12
Birdoj kun Esperanto-nomo kantas
por vi 63/8
Ciganoj 64/12
Diskutgrupo por lesbaj, ambaŭsek-
semaj kaj transseksaj virinoj
64/12
Diskutgrupo pri Esperanto-subtito-
lado de filmoj 65/18
Ekstrema humuro en Esperanto 63/
7
En la e-librejo 65/15
Esptajpi 65/188
Google en Esperanto 62/14
Ĝangalo (retsito) 62/14
Internacia pedagogia revuo 62/14
Mozilla 62/14
New Esperanto Word Processor for
Macintosh Computers 66/6
Plej legataj e-libroj 63/7
Programo *Copy-Writer* por Windows
64/12
Radio 3ZZZ 66/14
Ret-info anstataŭas *Eventojn* 62/14
Rigardinda legocentro 65/10
Terminaroj 1980-2002 64/12
Virtuala UK 2003 64/12
www.lernu.net 64/12
Yahoo-grupo por tradukado 63/8

Konkursoj: 63/22, 64/30

Lingvaj temoj:

Koreo/Koreio? (Donald Broadribb)
64/17

Laŭ mia vidpunkto: *káj kaj áŭ*
(Marcel Leereveld) 66/11

Laŭ mia vidpunkto: Landnomoj
(Marcel Leereveld kaj Donald
Broadribb) 65/26

Netradukeblaj esprimoj (Donald
Rogers) 65/16

Praktika teorio pri transitiveco
(Marcel Leereveld) 63/18

Literaturaĵoj:

Bona pano, bona viando, bona Dio,
ni manĝu (June Perkins) 65/7

La geedziĝa donaco (Ronald Gates)
62/3

La sonĝo (Trevor Holton) 64/3

Marta kaj Gastono (Gaye Phillips)
65/23

Milita floro miksas la simpatiajn
ŝnurojn (Debra McCarney) 62/
17

Nokto da turmento (Franceska
Toubale) 66/10

Nekrologoj:

Brian Curry (verkis Terry Manley)
61/9

Clarence Dunstan (verkis Leila Lu-
cas) 61/28

Ralph Harry (verkis Marj Ellyard
k.a.) 61/10

James Harwood (verkis Margaret
Chaldecott) 63/9

Florence Fay Koppel 64/14

Ralph V. Morgan (verkis Jackie
Fox) 63/10

Howard Paterson (Betty Aulse-
brook) 66/14

Else kaj Harry Peddie (Betty Clem-
inson) 65/15

Odlo Bokserp: 65/30, 66/28

Recenzoj:

Angla-esperanta hungara etvortaro
pri lernado kaj laboro 62/25

Blankaj noktoj (rec. Donald Broad-
ribb) 64/5

Esperanto-programo de Radio 3ZZZ
(rec. Donald Broadribb) 63/4
(Vidu ankaŭ 65/8 kaj 66/11)

Interlingvistiko kaj esperantologio
65/10

Kompendio de psikanalizo (rec.
Donald Broadribb) 65/5

La aventuroj de Pinokjo (rec.
Donald Broadribb) 64/4

*La baha kredoj kaj Esperanto reali-
gas la mondan pacon* (rec. Mar-
cel Leereveld) 61/8

La falo de la domo Usher (rec.
Donald Broadribb) 63/4

La nova plena ilustrita vortaro de
Esperanto (rec. Marcel Leerev-
eld) 61/3

Maigret kaj la maljuna damo (rec.
Donald Broadribb) 63/3

Naskiĝo de la rustimuna ŝtalrato
(rec. Donald Broadribb) 62/25

Skribas la legantoj:

Paul Desailly (spertoj en Ĉinio) 64/
18

Les Garkas (pri Radio 3ZZZ) 63/18

Brendan Linnane (pri piedpilko) 61/
27

(pri la *Föhn*) 63/17

(pri citaĵo el Cezaro) 66/18

Leila Lucas (pri morto de Clar-
ence Dunstan) 61/28

Jonathan Moylan (pri la literumado
de lia nomo) 63/17

Franciska Toubale (pri intervjuado)
61/27

Ŝercverkoj

Kiel batali kontraŭ la burokratoj
63/15

Kuirregulo (Jennifer Jefferies) 64/
15

La magoagotago 62/18, 63/14

MisPIV 62/23

Spritaj splitoj kaj preskeraroj 63/30

La Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Aŭstralia Esperanto-Asocio:
<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: *Matthew Maguire*, 4 Nioka Rd, Nar-rabeen NSW 2101.

Vicprezidantoj: *Jennifer Bishop*, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122. ☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806 (BH). esperanto@education.monash.edu.au.

Terry Manley, 50 Alagalah St NE 55, Narrom-ine NSW 2821. teren@mail.ans.com.au

Sekretario: *John Gallagher*, 81 Lalla Road, Lill-lydale Tas 7268. abcet@ozemail.com.

Helpsekretario: *Hazel Green*, 44 Toowoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio. hazgreen@tw-mba.net

Kasisto: *Stephen Pitney*, 57 Denham St, Haw-thorn Vic 3122. Pitney@goldenit.net.au.

Helpkasisto: *Ken Rolls*, 31 Miller Crescent, Mount Waverley Vic 3149. kenjohnrolls@yahoo.com.au

Kotizoj:

Aŭ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por famil-iano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto de AEA.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:
<http://www.esperanto.org.nz>

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

Prezidanto: *Bradley McDonald*, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ 09 579 4767.

bradley@esperanto-lingvo.org

Sekretario: *Howard Gravatt*, PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035. ☎ 09 626 6129.

hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: *Jackie Fox*, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ 09-826 2081.

jackiefox@paradise.net.nz

Kotizoj:

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

Esperanto sub la Suda Kruco

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6392, Aŭstralio. ☎ (08) 9641 1937. 📠 (08) 9641 1134. E-poŝte: sudakruco@sudakruco.org. Retsito: <http://sudakruco.org>. Membroj de AEA kaj NZEA aŭtomate ricevas *ESK*-on. Prezo de pliaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: por membroj de AEA kaj NZEA, po Aŭ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Menu de la Libroservo de AEA. Abonoj ekster Aŭstralazio kostas €23,70; pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 2003 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 2003 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita. Ĉi tiu numero de *ESK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac. La programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata uzante Acrobat-on.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K., K.R.A.J.O.N., K.R.E.T

Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisiistoj

Vera Doloro, L.M.K., D.H.A.M.N.

[Lia Multsuferanta Kontrolanto, Dumviva Honorinda Agoblogotago-Membro Nepra]

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York Wa 6302, Australia

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic 3168, Australia

If undeliverable return reply paid to

D. Broadribb

PO Box 643

York WA 6302

Australia

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

Vol. 11, No. 6, Novembro-Decembro 2003

Print Post Approved

PP631048/00005

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA

SURFACE
MAIL